# bulteno

**de Esperantistaj Kluboj Praha kaj Brno**

**1/1994**

**PERIODIKUM ESPERANTSKÝCH KLUBŮ V PRAZE A V BRNĚ**

## Umberto Eco znovu vystoupil ve prospěch esperanta

**Kniha Umberta Eca "Hledání perfektního jazyka"**, která byla vydána současně v angličtině, francouzštině, němčině, španělštině a italštině, byla v závěru roku 1993 veřejně prezentována v Římě. Umberto Eco v přednášce a v následující diskusi vyslovil řadu argumentů ve prospěch esperanta a znovu přesvědčil publikum, že po několikaletém studiu velmi dobře pronikl do problematiky plánových jazyků. Přítomní jazykoví odborníci z řad esperantistů, kteří v diskusi s Umbertem Ecem hodlali vystoupit ve prospěch esperanta, byli překvapeni tím, že on sám použil prakticky všechny nejdůležitější argumenty, které oni sami měli pro tento účel připraveny. Navíc je Umberto Eco prezentoval s obratností dobrého řečníka a vtipného glosátora. Široké publikum, v němž vedle univerzitních profesorů bylo i mnoho žurnalistů, okouzlil četnými anekdotami a vtipnými replikami, jakož i znalostí nevšedních faktů z historie evropské kultury, které prokládal četnými citáty z bible, Platóna a mnoha děl dalších známých i méně známých evropských středověkých i moderních filozofů a jazykovědců.

Cenné je jeho prohlášení, že esperanto je jediným plánovým jazykem, který se stal jazykem skutečně živým. Dle svědectví účastníků přednášky a následující diskuse, byly Ecovy závěry ve prospěch esperanta natolik jednoznačně příznivé, že jeho vystoupení vyznělo fakticky jako přednáška propagující esperanto, a to přesto, že Umberto Eco sám esperantistou není.

podle Heroldo de Esperanto č.2/1994

**Mince esperantské unikátní universální měny "Steloj"** (hvězdy) byly znovu zařazeny do komisního prodeje Světovým esperatským svazem (kancelář UEA v Rotterdamu). Jde o čtyři mince v hodnotách 1, 5, 10 a 25, podle hodnot z bronzu, mosazi, směsi niklu a mědi a ze stříbra. UEA je nabízí jednotlivě i v celém kompletu za cenu 75 NGL. Nabídka nepochybně zaujme numismatiky i sběratele - esperantisty. Do prodeje byl dán nevelký zbytek zásob mincí, takže s objednávkou příliš neotálejte!

## Výroční členská schůze Klubu esperantistů v Brně dne 26.1.1994

V roce 1993 se uskutečnilo 42 klubových večerů s pořadem, v době letních prázdnin se schůzky nekonaly. Ze Spojklubu, kde jsme se scházeli po tři roky každé úterý, jsme se v lednu 1994 museli z důvodu stavebních úprav odstěhovat. Přemístili jsme se do klubovny na Starobrněnské ulici č. 15. Avšak od ledna 1994 se konají schůzky namísto v úterý každou středu.

**Klubové programy** byly kvalitní a mimo členů klubu se na jejich zajištění podíleli hosté: Lubomír Huf z Ivanovic na Hané, Linhart Rýznar ze Svitav, Štěpánka Rousková z Říčan u Prahy, Eva Seemanová z Prahy, Claude Martins z Francie a dr. L. Medvedev z Ruska.

**Kurz esperanta pro začátečníky** po přestávce byl zahájen od září 1993 se třemi zájemci, bez přestávky běží kurz pro pokročilé. Oba kurzy vede Mgr. Zdeněk Hršel.

Byla vydána 4 čísla **Bultena**, poslední dvě společná s EK Praha.

M. Malovec rediguje časopis ČES "Starto" a Ing. K. Daněk a další členové klubu se podílí na jeho rozesílání.

**Klubová knihovna** je nadále deponována u M. Malovce. Z nejzajímavějších přírůstků jmenujme:

M. Bulgakov "Majstro kaj Margareta", G. G. Márquez "Cent jaroj da soleco".
**Esperantská literární nadace ELFo** pokračovala v přípravě titulů pro vydání. S největší pravděpodobností se v roce 1994 objeví Čapkova "Válka s mloky". Díky dárcům se výrazně zvýšil základní vklad nadace.
**Nově zvolený výbor:** Ing. Jana Burianová (zvláštní úkoly "BBB"), Ing. Karel Daněk (sekretář), Eva Hliněnská (propagace), Mgr. Zdeněk Hršel (předseda), Marta Lorková (pokladní), Miroslav Malovec (1. místopředseda), Věra Podhradská (2. místopředseda), a čestní členové – Josef Vondroušek, prof. Alena Růžičková - Pavlínová, RNDr. Ing. Jaromír Šikula, CSc. **Revizní komise**: Arnošt Balaš a Jarmila Veselá.

## Anoncoj

Estrino de la privata muzeo de poŝtkartoj volonte aranĝus ekspozicion de poŝtkartoj kun E-temoj, ankaŭ de poŝtmarkoj kaj stampoj. Por famigi Esperanton inter multaj vizitantoj de tiu muzeo mi petas ĉiujn pri helpo. Sendu al mi karton (aŭ kartojn) rilatan al Esperanto. La unuan malgrandan ekspozicion de ricevotaj kartoj mi intencas aranĝi dum la IIa Mondkongreso de E-handikapuloj en Kladno 1994-07-9/16. Anticipan dankon al ĉiuj donacontoj. Pri sukceso aŭ nesukceso mi informos.
**Adreso**: František Molík, Zákoutí 269, 547 01 Náchod - Nový Svět

Fotokopion de sia eseeto "Kiel prononci en Esperanto" (surbaze de eldiroj de Zamenhof kaj fonetikisto John Wells), publikita eksterlande (ĉar Starto montris ne havi spacon por liaj artikoloj) sendos al interesantoj, post ricevo de poŝtmarkoj en valoro 4 Kč, la aŭtoro: J. Mařík, Žitná 32, 120 00 Praha.

**Už jste se přihlásili na LETNÍ ESPERANTSKÝ TÁBOR do Lančova?**

Etapy: 3. - 16. července; 17.- 30. července a 31. července - 13. srpna
Cena pro mládež do 18 let a studující 1.800,- Kč, pro ostatní 2.000,- Kč. Pro účastníky minulých ročníků 1.700,- Kč.

## Výroční členská schůze Klubu esperantistů v Praze 21.2.1994

Hlavní úsilí v roce 1993 směřovalo k zachování klubových místností. Momentální klidová situace není definitivní. Náš odchod z Vejvodovy ulice lze očekávat v souvislosti se zahájením rekonstrukce domu (plánována v polovině roku 1994). Spolupráce se sponzorem "CK Bohemia fantasy" byla v červenci 1993 ukončena. Propagační skřínka zůstala pouze v Michalské ulici.
K 31. 12. 1992 měl Klub esperantistů v Praze 161 členů, k 31. 12. 1993 o deset méně. Z celkového počtu 151 členů zaplatilo členské příspěvky 62 členů.
**Knihovna klubu** je zčásti katalogizována, práce byly přerušeny pro dlouhodobé onemocnění pí Maudrové. Pro případ nutnosti opustit místnosti ve Vejvodově ulici bylo dohodnuto uložení knih v E-muzeu v České Třebové.
Probíhají **dva kurzy esperanta**, vedené Ing. Blažkovou, pro celkově 7 účastníků.
**Klubovní večery** se konají pravidelně každé pondělí, na programech se podílejí členové i hosté. V roce 1993 se konalo 52 schůzek, v návštěvní knize je podepsáno 989 příchozích, z toho 58 hostů.
**Klubovní bulteno** je od čísla 4/1993 je vydáváno společně s EK Brno.
**Finanční situace** je nepříznivá, příjmy celkem činily 34.236,- Kč, výdaje ve stejném období 61.951,- Kč. Z příjmů: členské příspěvky 5.126,- Kč, dary 22.230,- Kč, kursy 900,- Kč. Výdaje: nájemné Vejvodov 10.000,- Kč, elektřina 5.163,- Kč, plyn 3.236,- Kč, Videostop 20.000,- Kč a poštovné 1.105,- Kč.
**Nově zvolený výbor:** Jaroslava Blažková - výuka, propagace, Květa Hubnová - místopředseda, Jindřich Ondráček - hospodář, Jiří Patera - předseda, Jaroslav Šindler - pokladník. Revizní komise: Anna Kubová, Josef Sojka.

**Niaj Mortintoj**

**11.1.1994 forlasis nin Václav Lorenz**, 86-jara, unu el la kvaropo de antaŭmilitaj fidelaj membroj de EK Praha ĝis nun vivantaj (krom li Zahradník, Kynčl kaj Mařík). Lorenz estis ĉiam nia bona, gajema kamarado, daŭre kun iu funkcio kluba, ĉu "majordomo", ĉu teknika prizorganto de la Bulteno. Dum la lasta jardeko li vivis en hospitalo por longe malsanaj pacientoj kaj poste emeritula domo. La lastan adiaŭon ĉeestis Šperling kaj Mařík.
**24.2.1994 forpasis nia membro d-ro Vladimír Čečelín**, 73-jara. La sepulto okazis sen ceremonioj. Ni ŝatis liajn lumbild-paroladojn pri vojaĝoj en Eŭropo kaj norda Afriko, kun celoj geologiaj. Li postlasis en manuskripto interesan supervidon pri la homara historio "El abismo de epokoj". Interese, ke la impulson por verki ĝin donis lia kvinjara nepo, ĉiam avida pri historiaĵoj.

Ni menciu ke mortis la konata slovaka verkisto Ladislav Mňačko, kies verkon japanigis s-ano Kei Kurisu, je kies peto mi prizorgis antaŭparolon de Mňačko por la 2-a eldono. Liverita al Kurisu en marto, kaj jam en julio samjara- per la japana rapideco - mi havis pretan libron, kun dediĉo al mi en la teksto fare de Kurisu. Kaj jaron poste 1991 Mňačko mem subskribis al mi tiun libron. (Raraĵo por kolektantoj!)

- jm -

# Programoj de klubaj vesperoj

PRAHA

APRILO

| | | |
|---|---|---|
| 11. | Miaj spertoj de Fora Oriento | S. Chrdlová |
| 18. | Promenoj tra Prago | J. Patera |
| 25. | Ekzemploj de praktika uzo de Esperanto | dr. P. C hrdle |

MAJO

| | | |
|---|---|---|
| 2. | Promenoj tra Prago | J. Patera |
| 9. | Libera tribuno | ĉiuj |
| 16. | F.V.Lorenz - la duobla pioniro (I) | J. Mařík |

JUNIO

| | | |
|---|---|---|
| 6. | Kio estas framasonio | S. Zedníkové |
| 13. | F.V.Lorenz - la duobla pioniro (II) | J. Mařík |
| 20. | Ekskurso tra Proksima Oriento (diapozitivoj) | C. Martens Francio |
| 27. | Promenoj tra Prago | J. Patera |

BRNO

APRILO

| | | |
|---|---|---|
| 6. | Ĉe Dia Tombo en Jerusalemo (diapozitivoj) | E. Brablecová J. Veselá |
| 13. | Estrado de animaloj | A. Balaš |
| 20. | Traduka konkurso | Mgr. Z. Hršel |
| 27. | De Vezuvio al Pompejo | L. Rýznar Svitavy |

MAJO

| | | |
|---|---|---|
| 4. | Rakontisto Vladimír Neff | M. Malovec |
| 11. | Oniskoj kaj aselinoj | RNDr. E. Wohlgemuth |
| 18. | El la monda historio | A. Procházka |
| 25. | Ni ludu komputile | Ing. K. Daněk |

JUNIO

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Mondo de fabeloj | M. Lorková |
| 8. | Historietoj el la historio | J. Vondroušek |
| 15. | Libera forumo | ĉiuj |
| 22. | Ekskurso tra Proksima Oriento (diapozitivoj) | C. Martinus Francio |
| 29. | Antaŭferia amika vespero | Ing. K. Daněk |

---

**Nová adresa Českého esperantského svazu**

Český esperantský svaz nyní užívá korespondeční adresu společnou s Klubem esperantistů Praha. Veškerou korespondeci zasílejte na tuto adresu:

ESPERANTO PRAHA
poštovní schránka 1068
111 21 Praha 1

Jiří Středa

PRI JURÁŠEK, KIEL LI IĜIS SANKTA JURÁŠEK RESPEKT INDA
(la lasta parto)

En la kastelon venis ankaŭ muzikistoj, por melodii antaŭ la reĝidino. Alrajdis eĉ kavaliroj kaj sub la fenestro ili luktis kvazaŭ pri vivo kaj morto per akraj glavoj, nur por ĝojigi la reĝidinon. Ĉie gaja amuzo, eksplodaj ridoj.
Sed kie restis nia Malgranda Jurášek?

Estis tago post dimanĉo, tuj post la tagmezo, kiam sur la kastela pordego eksonis: "Frapi, frapi, frap!"
La aminda reĝidino aŭskultis kaj poste ĝentile demandis:
"Kiu estas?"
"Mi, kavaliro reĝido Jurášek."
"Malfermu la pordegon por la reĝido, li eniru!" Kaj tuj poste ektrumpetis solena fanfaro.

En la korton enrajdas Jurášek sur sia punktomakula henanto. Li alligis la ĉevalon kaj rapidis al la reĝidino.
"Kiom da kapoj havas via drako?"
"Tri."
"Domaĝe."
"Kial domaĝe?"
"Ĝi prefere havu sep kapojn, por ke la heroaĵo meritu la penon."
"Al mi sufiĉas la trikapa."
"Unu, dua, tria! Ĉiuj falos malsupren!"
"Mi ne komprenas vin, brava kavaliro?"
"Mi forhakos la kapojn, unu-du-tri."
"Sed kial?"
"Por liberigi vin, malfeliĉa reĝidino."

"Sed mi ne estas malfeliĉa reĝidino."
"Vi devas esti malfeliĉa, se vin prizonas trikapa drako."
"Ĝi ne prizonas min."
"Kiel kompreni tion?"
"Mi kaŝas ĝin ĉi tie."
"Antaŭ kiu?"
"Antaŭ kavaliroj, kiuj havas nenian pli utilan laboron ol fanfaroni, ke ili forhakos ĝiajn tri kapojn."
"Sed mi ne fanfaronas."
"Haki kapojn vi volus!"
"Vere jes!"
"Sed kial?"
"Por fari ion bravan, por ke oni ne plu nomu min Malgranda Jurášek. "
"Jen, kia vi estas!"
"Reĝidinjo, reĝidinjo, almenaŭ unu kapon!"
"Eĉ ne unu! Al mia amata drako vi ne rajtas haron elŝiri!"
"Kaj vidi, ĉu vidi mi povus ĝin?"
"Se vi ne vundos ĝin, kial ne."

Reĝido Jurášek forkondukis reĝidinon Ilonja al la ĉevaleto punktomakula henanto, kaj komune ili rajdis en la subkastelon al la trikapa drako. Antaŭ la foriro ili ŝlosis la kastelon per sep seruroj. Reĝidino Ilonja restis ĉe la rando de pina arbareto, por ke la kavaliro povu interparoli kun la drako kiel viro kun viro.
Sur altaĵo staris simpla, ligna kabano. Jurášek havis taskon trifoje frapi la budon, la drako certe vekiĝos.
Nun Jurášek paŝas ĉirkaŭ la ligna kabanaĉo, ne kredante al la propraj okuloj. La kabano estas malalta, nur kunmetita el lignotabuloj.
"Mi frapos unuan fojon, la tegmento forflugos. Mi frapos la duan fojon, la pordo elsaltos. Mi frapos trian fojon, restos nur amaso da ligno. Ke ĉi tie loĝas drako? Ĝi devus esti pli malgranda ol melhundo de nia ĉasisto. Nu, mi frapos."
"Ĉu frapis vi, mia karulo sankta respektinda? Kion vi volas?"
"Mi frapis ... kaj mi venis ... por ..."
"Ne parolu plu! Vi venis forhaki miajn tri kapojn."
"Ne tiel, mi nur ..."
”Vi ne estas la unua, mia karulo sankta respektinda."
"Mi volis ...eble ... sed nun ..."
"Nun ni interluktos. Kie vi havas glaveton, kavaliro?"
"Glaveton? Reĝidino Ilonja ordonis al mi, ke mi ne rajtas vundi vin. Eĉ ne unu vian kapon mi rajtas forhaki."
"Domaĝe, domaĝe! Almenaŭ montru al mi, kiel forta vi estas, mia karulo sankta respektinda! Se vi kapablos sidi sur mia kolo, vi estas fortulo."
"Mi bridis mian ĉevaleton punktomakulan henanton, mi bridos ankaŭ vin. Hola, drako, hola! Antaŭen! ... Kion vi diras? Ĉu mi havas sufiĉan forton?"
"Forton vi havas sufiĉan. Preskaŭ larmoj ekfluis en miaj okuloj. Nun ni provos, ĉu vi estas saĝa."
"Ĉefe, ke mi estas plena de forto."
"Sciu, mia karulo sankta respektinda, havi forton, tio ne estas la plej grava. "
"Bone! Provu, ĉu mi havas sufiĉe da saĝo!"
"Mi prezentos al vi malfacilan enigmon. Se vi divenos, vi estos venkinto!"
"Reĝidino sidis malgaje ĉe la fenestro kaj rigardis direkte al naŭ montetoj, sep herbejoj kaj kvin riveretoj. Subite ŝi sentas, ke perloj el diademo sur la frunto ruliĝas sur ŝia vizaĝo en la sinon. Ŝi palpas la diademon, sed eĉ ne unu perlo mankas."

"Kiel povus manki al ŝi perloj, se al la reĝidino ruliĝis sur la vizaĝo larmoj, grandaj kiel perloj?"
"Ĝuste! Vi divenis! Vi venkis!"
"Ĉu vi opinias, ke mi jam estas granda? Ke mi ne plu estas Malgranda Jurášek?"
"Vi estas bravulo! Kaj mi nomos vin Sankta Jurášek Respektinda."
"Ĉu tio estas nomo?"
"Via nomo!"
"Bela nomo."
"Aŭskultu, Sankta Jurášek Respektinda, vi volas reveni hejmen sola?"
"Ĉu vi volus iri kun mi?"
"Tute neeee! En la pina arbareto iu atendas."
"Vi pensas pri mia ĉevaleto punktomakula henanto?"
"Tute neee! La reĝidino tie atendas."
"Ĉu min?"
"Kiun alian? Ĉiu reĝidino atendas, ke foje venos reĝido kaj forkondukos sin. Do iru! Kuru! Mi denove dormemas."

Venu kune
tra la vojo,
kiu estas
senfina.
Nin atendas
multaj beboj.
Amo ardas
proksima.

En la kastelo jam eĉ paseroj sur la tegmento sciis, ke okazos granda kaj glora geedziĝo. La koko sur la plej alta turo trifoje kokerikis, kaj la korteganoj malfermis ĉiujn fenestrojn plenlarĝe.

Sur la muregojn kuris muzikistoj kaj ludis la plej belan, la plej gajan kaj plej solenan kanton.
La kuiristoj denove kuradis el la kuirejo en la provizejon, el la provizejo en la kuirejon, tien kaj reen. Poste ili rulis paston, kuiris, fritis, bakis, rostis kaj fumaĵis. Kion ili preparis, tion ili forportis el la kuirejo en la ceremonian salonon. Kia aromo! Kiu preteriris, tiu lekis siajn lipojn!

En la kastelon de la reĝidino Ilonja alveturis la paĉjo kaj panjo de Jurášek.
"Jurášek, mia malgranda ..." vokis la reĝidino, sed tuj ŝi haltigis sin. La paĉjo reĝo rapidis ĉion korekti kaj vokis: "Vivu nia Sankta Jurášek Respektinda! Gloro! Gloro al li!"
Poste iuj komencis danci.
Kiam la amuzo kulminis, al la kastela murego alnaĝis blanka nubeto.
"Ni deziras al vi, Jurášek, tiom da bubetoj kiom da nubetoj. Ni deziras al vi, Jurášek, multe da feliĉo, multe da feliĉo, multe da felico!"
Jurášek kun Ilonja ankoraŭ ne sukcesis danki, kiam en la geedzigan salonon enkuris Fulmotondro.
"Lumon, varmon vi sopiru, Fulmotondro vin inspiru."
Pafis krako, fulmoj elflugis kaj Fulmotondro estis for.

Antaŭ noktomezo, kiam oni ankoraŭ ne estis dormemaj, vizitis la geedziĝon kun gratulo Noktulo kaj Tagulo.
"Mi gardos vian dormon serenan."
"Mi invitos la sunon matenan."
"Restu kun ni, Noktulo," vokis Jurášek.
"Kaj vi ankaŭ, frato Tagulo."

"Ne, ne, mi devas por vi gardi Nokton."
"Kaj mi la morgauan tagon."
"Do almenaŭ baldaú nin vizitu denove, kamaradoj," vokis post ilin Jurášek.
"Kompreneble, ke ni venos. Ni ne forgesos vin."

La mateno jam proksimiĝis. De malproksime estis aŭdebla la ronkado de la drako kaj tio signifis, ke ĉiuj devas iri dormi. Kaj ili iris.

Se iu volus rakonti al vi la fabelon pri Sankta Jurášek Respektinda alimaniere, ne kredu al li. Ĉio okazis precize tiel, kiel vi aŭdis.

*tradukis M. Malovec*

---

Klub esperantistů Brno, poštovní schránka 154, 657 54 Brno 2
ESPERANTO PRAHA, poštovní schránka 1069, 111 21 Praha 1

Komuna informilo de E-kluboj. Aperas kvarfoje jare. Ĉi-numeron preparis J. Patera, J. Mařík (Praha) kaj J. Vondroušek, M. Malovec, mgr. Z. Hršel kaj inĝ. K. Daněk (Brno).

NOVINOVÁ ZÁSILKA
Podávací pošta Brno 2, snížený tarif povolen 7.3.1990, JmŘS Brno, č.j. P/3-2982